


La esperantistoj kongresis en Zagreb



La KELI-kunveno en la Universala Kongreso en Zagreb (kun invito al IKUE). De maldekstre: Hatto v. HATZFELD, Britta REHM, Adolf BURKHARDT, Barbara PIETRZAK. (fotis M. BELOŠEVIĆ)

Sekvo de la traduko de la epistolo al la Romanoj

RUSIO

BULGARIO

La Ekumena Kongreso

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala,
kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerck
☎ +31 251 231941; ✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen
a/d Rijn, Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn,
Germanio; ☎ +49 7131 162688; ✉ keli.@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto,
minimume €15,- ☉ Membro-subtenanto €22,-
☉ Nura abono: pagante rekte al KELI €12,-
☉ pagante al Libroservo €14,- Sendoj de
okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la
kasisto de KELI ☉ Se estas en via lando UEA-
poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu
prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI
☉ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Abonprezo sen membreco en KELI: €12,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al
la kaso de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas
nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko
permesataj, kondiĉe, ke oni citas la fonton.
Specimenon kun represo aŭ traduko oni
sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo **hejme** Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
☎ +48 32 763 37 13; ✉ k.leja@ineta.pl

ENHAVTABELO

- 75 **Romanoj ĉapitroj 2 ĝis 8**
Nova traduko de Gerrit BERVELING
- 85 **La vivo de la justa Simeono**
Biografio de rusia sanktulo per
Larisa KUZMENKO
- 86 **La Rusa Ortodoksia Eklezio:**
Regionaj statistikoj, kaj
raporto pri patriarka vizito
- 90 **Bulgario urĝe bezonas nian**
solidarecon
Raporto de Jacques TUINDER
- 96 **15-a Ekumena**
Esperanto-Kongreso
Rapida raporto de Philippe
COUSSON

REDAKTORAJ VORTOJ

Karaj gefratoj gelegantoj,
Ĉi tiu numero alvenas al vi malfrue, ĉar ĝi
eliris el mia labor-ĉambro ankaŭ malfrue.

Finiĝis la feri-periodo. Atendas nin nova
aktiva epoko. Dum tiu tempo, ni prepariĝos
al nia kongreso en Hungario, kies datoj ne
estas definitive fiksitaj ĝis hodiaŭ, kiam mi
skribas. Vi estos rapide informitaj. Mi petas,
ke la hungaroj provizu min (nin) per interes-
saj informoj pri la kristana vivo de la lando
dum la lastaj dek jaroj.

Tio, kompreneble ne malhelpu la aliajn
(ankaŭ la hungarojn) daŭre provizi la redak-
toron per tekstoj por aperi en nia revuo. Vi
rimarkis (aŭ vi ne malfermas ofte nian ga-
zeton) ke de tempo al tempo ni aperigas la
novan tradukon de la Nova Testamento de
Gerrit BERVELING. La longa epistolo al la
Romanoj aperas en tri partoj. Vi jam legis la
unuan ĉapitron. Nune vi ricevas la 7 sekvan-
tajn, kaj la lastajn vi ricevos en la venonta(j)
numero(j).


Ĉi dumonate, ne maltrafu la legadon de la
rusaj tekstoj. Ne tiel ofte vi ricevas informojn
el la unua mano el Ruslando.

Bonan legadon, kaj ni atendas ankaŭ vian
kontribuon.

Philippe COUSSON

AL LA ROMANOJ*

Nova traduko de Gerrit BERVELING



*Gerrit BERVELING dum klarigoj pri
tradukado de la Biblio en la Ekumena
Kongreso en Zagreb. (fotis P.C.)*

ankaŭ la hebreoj pekas

2: 1 Sed tial vi, homo juĝanta, kiu ajn vi estu: ankaŭ vi ne estas senkulpigebla. Ĉar per via juĝo pri aliaj vi juĝas vin mem. Ja vi, kiu juĝas, vi faras la samon. 2 Ni scias, ke prave Dio kondamnas, kiuj faras tiaĵojn. 3 Kaj vi, kiu juĝas pri kiuj faras tiaĵojn dum mem vi faras la samon: ĉu vi supozas, ke la Dian juĝon vi eskapos? 4 Aŭ ĉu vi malŝatas Lian riĉon je boneco, pacienco kaj toleremo? Ĉu vi ne komprenas ke la Dia boneco celas gvidi vin al konvertiĝo? 5 Per via sensenta kaj nepentema sinteno vi amasigas por vi mem kapitalon da kolero por la Tago de l' kolero, kiam manifestiĝos la Dia justa juĝo. 6 *Al ĉiuj Li rekompencos laŭ iliaj agoj:* 7 eternan vivon por kiuj fidele plenumante la bonon strebas al nepereemaj gloro kaj honoro; 8 sed ega kolero estos por kiuj ribeleme malakceptas la

* Kursivo en la traduko mem indikas citon fare de Paŭlo.

⁵ Ĉe Paŭlo 'Greko' ofte kvazaŭ simbolas la 'ne-Hebreon', la gojon.

veron akceptante la maljuston. 9 Turmento kaj premateco <estos> por ĉiu homo, kiu plenumas malbonon, unuavice por la Hebreo, sed same por la Greko⁵; 10 gloro, honoro kaj paco <estos> por ĉiu, kiu faras bonon, unuavice por la Hebreo, sed same por la Greko. 11 Ĉar Dio homojn ne distingas laŭ aspekto.

Torao kaj cirkumcido

⁶ Por 'leĝo' kaj 'Torao' Paŭlo uzas la saman Grekan vorton *nomos*.

12 Kiuj ja sen-leĝe pekis, ankaŭ sen-leĝe pereos; kaj kiuj kun-torae pekis, tiujn kondamnos la Torao.⁶ 13 Ĉar ĉe Dio oni ne justas per aŭskultado al la Torao; justigitaj estos la plenumantoj de la Torao. 14 Se ja gojoj, kiuj ne havas la Toraon, el si mem faras kion demandas la Torao, ili mem estas Torao por si mem, eĉ se la Toraon ili ne havas. 15 Ili montras ke, kion postulas la Torao, estas skribita en ilia koro. Tion atestas ilia konscienco kaj iliaj pensoj, kiuj ĉu kulpigos ĉu senkulpigos ilin 16 je la tago, kiam laŭ mia bona mesaĝo Dio juĝos pri la kaŝitaj agoj de la homoj, per Mesio Jesuo.

17 Vi kiu vin nomas Hebreo, vi kiu apogiĝas je l' Torao kaj kiu fieras pri Dio, 18 vi kiu konas Lian volon kaj, instruite de l' Torao, distingas kio vere gravas; 19 vi kiu vin faras gvidonto de blinduloj, lumo por la homoj en tenebro, 20 edukanto de l' sensaĝaj kaj instruisto de l' neadoltoj; vi kiu en la Torao posedas la enkarniĝon de scio kaj vero; 21 vi, instruanto de aliaj: ĉu vi ne kapablas instrui vin mem? Vi heroldas ke oni ne ŝtelu, kaj ĉu mem vi ŝtelas? 22 Adulton vi malpermesas kaj ĉu vi mem adultas? Vi abomenas idol-statuojn, kaj ĉu mem vi prirabas templojn? 23 Fiera vi estas pri la Torao, sed Dion vi malhonoras malobeante ĉi saman Toraon! 24 Tial estas skribite: *Pro vi oni blasfemas la nomon de Dio inter la gojoj.*

25 La cirkumcido certe valoras, sed nur se la Toraon vi plenumas; se tamen vi malobeas la Toraon, via cirkumcido fariĝis kvazaŭ necirkumcido. 26 Kaj inverse, se gojo⁷ obeas la ordonojn de l' Torao: ĉu lia necirkumcido ne valoras kiel cirkumcido? 27 Kiu sen korpa cirkumcido plenumas la Toraon, tiu juĝos pri vi, kiu kun-torae kaj kun-cirkumcide malobeas la Toraon. 28 Ĉar esti Hebreo, ne estas <nur> io eksteraĵa, kaj <ankaŭ> cirkumcido ne estas <nur> io eksteraĵa kaj korpa! 29 Hebreo vi estas interne, kaj la vera cirkumcido estas tiu de l' koro, spirita <cirkumcido>, ne fare de homoj sed de Dio.

3: 1 'Do kiun avantaĝon tiam havas la Hebreo super la ceteraj? Kian utilon havas esti cirkumcidita?' 2 Multe, ĉiurespekte. Kaj unuavice tion, ke al ili estis konfiditaj la Diaj eldiroj⁸. 3 Kio? Ĉu <vi asertas ke> kelkaj el inter ili fariĝis malfidelaj? <Tiam mi de-

⁷ Laŭlitere: se necirkumcido obeas...

mandas vin:> ĉu ilia malfidelo povas neniigi la fidelon de Dio? 4 Nepre ne! Se eĉ ĉiu homo estus mensoga, Dio estas verama, ĉar estas skribite:

Vi estas justigata en Viaj diroj
kaj Vi venkos se oni volas juĝi Vin.

5 Sed se nia maljusteco konfirmas la justecon de Dio, ĉu tiam ni ne diru — mi ja parolas tre laŭhome — ke Dio estas maljusta se Li punas? 6 Nepre ne! Kiel alie Dio povus juĝi la mondon? 7 Sed se la Dia vero montriĝos pli granda per mia mensogado kaj se tiel kreskos Lia gloro, kiel mi ankoraŭ kondamniĝu kiel pekulo? 8 Aŭ ĉu validas la diro — kiun kelkaj malice atribuas al ni — 'Ni faru la malbonon por ke estiĝu la bono?' Ho, ili ja meritis sian kondamnon!

pekas ĉiuj

9 'Kio do? Ĉu tamen ni havas avantaĝon <super la ceteraj>?' Tute ne. Ni ja jam konstatis ke ĉiuj, Hebreoj same kiel Grekoj, troviĝas sub la potenco de l' peko. 10 Aŭ, kiel estas skribite:

Ne estas justulo, eĉ ne unu,
11nenu kiu saĝas,
nenu kiu serĉas Dion.

12 Ĉiuj devojiĝis, ĉiuj estas malvirtaj;
nenu faras la bonon,
nenu, eĉ ne unu.

13 Malferma tombo estas ilia gorĝo.

Per la lango ili trompas,
malantaŭ iliaj lipoj troviĝas vipura veneno.
14 Ilia buŝo plenas je malbenoj kaj amareco.
15 Iliaj piedoj hastas por verŝigi sangon.
16 Detruo kaj katastrofoj signas ilian vojon,
17 sed la vojon de l' paco ili ne konas.
18 Timo antaŭ Dio ne estas ilia celado.

19 Nu, ni scias ke la Torao direktas ĉiujn siajn dirojn al kiuj submetiĝas al la Torao. Jen do ĉies buŝo estas fermita, kaj la tuta mondo kulpas antaŭ Dio. 20 Ĉar je Liaj okuloj nenu homo estos justa pro obeado al la Torao; la Torao nur igas koni la pekon.

ĉiujn justigas la fido

21 Sed nun, sendepende de la Torao, manifestiĝis la Dia justeco, pri kio atestas Torao kaj Profetoj: 22 la Dia justeco kiu per la fido je [Jesuo] Mesio <transdoniĝas> al ĉiuj fiduloj, senescepte. 23 Ĉar ĉiuj pekis kaj ĉiuj estas senigitaj de l' Dia gloro.

24 Ĉiuj senpage⁹ justigās per Lia graco, pro la saviĝo en Mesio Jesuo. 25 Por la fiduloj Dio indikis lin kiel repacigilon per sia sango. Tiel Dio volis montri Sian justecon, tolereme pardonante la pekojn de l' paseo. 26 Nun, en nia tempo, justigante ĉiun, kiu vivas el fido je Jesuo, Li volis montri Sian justecon por ke montriĝu ke Li mem estas justa.

27 Kie do restas singlorado? Tiu fariĝis malebla! Per kiu Torao? Ĉu <per tiu> de l' agoj? Ne, sed per <la Torao> de la fido. 28 Mi konvinkitas, ke la homon justigas la fido, ne la agoj laŭ la Torao. 29 Ĉu Dio estus nur la Dio de la Hebreoj, kaj ne de la gojoj? Ne — ankaŭ de la gojoj! 30 Ĉar estas nur unusola Dio, kiu surbaze de la fido justigos cirkumciditojn kaj gojojn. 31 Ĉu nun per la fido ni senvalidigas la Toraon? Nepre ne! Ni ja ĝuste validigas la Toraon.

Abraham kiel patro de l' fiduloj

4: 1 Kion ekzemple ni pensu pri Abraham, nia praulo? Kion li spertis? 2 Se ja Abraham justigis pro siaj agoj, li havas kialon por fieri. Sed ne antaŭ Dio! 3 Kion ja diras la Skribo? *Abraham fidis je Dio, kaj tio kalkuliĝis al li kiel justeco.* 4 Nu, kiu laboras, al tiu ne alkalkuliĝas la salajro kvazaŭ favoro, sed kiel juste ŝuldata rajtaĵo. 5 Sed al kiu ne laboras, sed fidas je Tiu kiu justigas la sendiulon, al tiu la fido kalkuliĝas kiel justeco. 6 Same <validas> pri la homo, kiun David nomas feliĉa kaj al kiu Dio alkalkulas la justecon, sen <ke temas pri> ties agoj:

7 Feliĉaj kies maljustaĵoj pardoniĝis
kaj kies pekoj estas kovritaj.

8 Feliĉa la viro, kies pekon Dio nealkalkulas.

9 Ĉu ĉi feliĉdeklaro rilatas nur la cirkumciditojn aŭ ankaŭ la gojojn? Ni diris ke *al Abraham la fido kalkuliĝis kiel justeco.* 10 Sub kiaj cirkonstancoj tio okazis? Ĉu jam cirkumcidita li estis aŭ ankoraŭ ne? Ankoraŭ ne! 11 *La signon de l' cirkumcido* li ricevis ĝuste kiel konfirmon por la justeco de la fido, kiun <li jam posedis> necirkumcidite. Tiel li fariĝis la patro de ĉiuj necirkumciditaj fiduloj, tiel ke ankaŭ al ili alkalkuliĝu la justeco. 12 Sed samtempe li ankaŭ <fariĝis> la patro de la cirkumciditoj, de tiuj nome, kiuj ne nur <apogiĝas> sur la cirkumcido, sed ankaŭ premas la piedsignojn de la fido, kiun nia patro Abraham jam havis kiam <li ankoraŭ estis> necirkumcidita.

13 Ankaŭ la promeso al Abraham kaj ties posteularo¹⁰, ke ili heredos la mondon, ne <apogiĝas> sur la Torao sed sur la justeco de

l' fido. 14 Se nur kiuj fidas la Toraon estos heredantoj, la fido ne havas sencon, kaj senrezulta restos la promeso. 15 Ĉar el la Torao rezultos nur puno, kaj kie ne estas Torao, ankaŭ ne estas kulpo. 16 Tial dependas de la fido, por ke estu graco, kaj ke la promeso estu certigita por la tuta posteularo, ne nur por kiuj ricevis la Toraon, sed por ĉiuj kiuj <imitas> la fidon de Abraham¹¹, la patro de ni ĉiuj. 17 Pri li ja skribitas: Mi faris vin patro de multaj popoloj. Kaj tio li estas antaŭ Dio je Kiu li fidis, Kiu vivigas la mortintojn kaj Kiu estigas kio ne ekzistas. 18 Kontraŭe al ĉiu atendo li esperis, kaj <li esperis> ke li fariĝos patro de multaj popoloj, kiel al li estis dirite: Tiel multnombra estos via posteularo. 19 Lia fido ne malfortiĝis, kiam — centjara — li pensis pri sia propra kaduka korpo kaj pri la arida utero de Sara. 20 Eĉ ne momenton li hezitis pri la promeso de Dio. Male, Dion li honoris per la forto de sia fido, 21 per sia nepra konvinko ke Li kapablas plenumi kion Li promesis. 22 Tial al li tio kalkuliĝis kiel justeco.

23 La vortoj *kalkuliĝis al li* estis verkitaj ne nur koncerne lin, 24 sed ankaŭ pri ni, ĉar ankaŭ al ni alkalkuliĝos la fido, se Tiun ni fidas kiu relevas Jesuon nian Sinjoron el la mortintoj: 25 <Jesuon> kiu estis transdonita pro niaj misfaroj kaj kiu estis relevita pro nia justigo.

vivi en paco kun Dio

5: 1 Justigite el la fido ni do vivas en paco kun Dio per nia Sinjoro Jesuo Mesio. 2 Per li ni ankaŭ havas aliron al tiu graco en kiu ni staras; dank' al li ni povas fieri pri nia espero je la gloro de Dio. 3 Kaj ne nur tio: ni eĉ fieras pri niaj elproviĝoj, konsciante ke la premateco kondukas al persistemo, 4 la persistemo al elprovita virto, kaj ĉi tiu al espero. 5 Kaj *la espero ne seniluziĝos*, ĉar la Dia amo verŝiĝis en nian koron per la sankta Spirito kiun ni ricevis.

6 Ĉar Mesio mortis por sendiuloj je la fiksita momento, dum ni ankoraŭ estis komplete senhelpaj. 7 Ne facile oni donus la vivon pro justulo, kvankam eble iu kuraĝus morti pro bonulo. 8 Sed Dio pruvas sian amon al ni ĝuste per tio ĉi, ke Mesio mortis pro ni dum ni ankoraŭ estis pekuloj. 9 Des pli certas ke ni, justigite per lia sango, dank' al li saviĝos de l' kolero. 10 Estante malamikoj, ni repaciĝis kun Dio per la morto de Lia filo; des pli certas ke, repaciĝinte, ni saviĝos per lia vivo. 11 Kaj ne nur tio: jam nun ni fieras pri Dio per nia Sinjoro Jesuo [Mesio], per kiu ni ricevis la repaciĝon.

¹⁰ Laŭlitere: kaj al ties semo.

¹¹ Alia eblo: kiuj vivas el la fido kiel Abraham.

12 Tial, samkiel per unu homo enmondiĝis la peko, kaj per la peko <ankaŭ> la morto, kaj kiel la morto tial venis super ĉiujn homojn ĉar pekis ĉiuj...¹² 13 Ja vere estis peko en la mondo antaŭ ol <estiĝis> la Torao; sed peko ne alkalkuliĝas se ne estas leĝo¹³. 14 Tamen la morto reĝis de Adam ĝis Moseo, do ankaŭ super tiuj, kiuj ne kiel Adam kulpis pri simila kulpo. Ĉi <Adam> estas bildo pri la Venonta.

15 Sed ne <statas pri> la graco kiel pri la kulpo. La kulpo de unu homo havigis al ĉiuj la morton, sed multe pli abundas la Dia graco kaj Lia dono por ĉiuj, <kiun Li donis> en ĉi unu homo: Jesuo Mesio. 16 Lia graco ne mezureblas je tiu unu peko. La juĝo kiu sekvis tiun mispaŝon, <rezultis> en kondamnon, sed la graco post tiom da mispaŝoj <rezultis> en kompletan justigon. 17 Pro mispaŝo de unu homo — do per tiu unu <homo> — ekreĝis la morto. Kiom pli grandioze — dank' al la unu homo Jesuo Mesio — vivos kaj reĝos tiuj, kiuj ricevos la plenecon de l' graco kaj la donacon de l' justeco!

18 Do, samkiel unu eraro kondukis al kondamniĝon de ĉiuj, tiel same unu justeco kondukos al justigita vivo por ĉiuj. 19 Kiel per la malobeo de unu homo ĉiuj fariĝis pekuloj, tiel justigis ĉiuj per la obeo de unu <homo>. 20 Ja aldoniĝis la Torao, por ke multobliĝu la mispaŝoj; sed kie ekabundis la peko, tie superabundas la graco. 21 Ĉar kiel la peko realigis sian regadon per la morto, tiel regos la graco per justeco kaj kondukos al eterna vivo, dank' al Jesuo Mesio nia Sinjoro.

liberigite de l' peko

6: 1 Ĉu sekvas el ĉi tio, ke ni plu pekadu por kreskigi la gracon? 2 Nepre ne! Kiel ni ankoraŭ vivu enpeke, — ni kiuj mortis por la peko?! 3 Ĉu vi ne scias, ke ni kiuj estis baptitaj al Mesio Jesuo, — ke ni estas baptitaj al lia morto? 4 Per la bapto al lia morto ni do entombiĝis kun li, por ke, same kiel Mesio per la gloro de l' Patro estis relevita el la mortintoj, ankaŭ ni vivadu novan vivon. 5 Ĉar se ni kvazaŭ kunkreskis kun lia morto, ni ankaŭ imitu lin en la releviĝo, 6 konsciaj, ke nia malnova homo krucumiĝis kun li. Per tio finiĝis la ekzisto enpeka, tiel ke ni ne plu servu al la peko. 7 Ĉar kiu mortis, laŭjure liberas de la peko.

8 Se kun Mesio ni mortis, ni ankaŭ kredas ke ni vivos kun li. 9 Ĉar ni scias ke Mesio, unufoje relevita el la mortintoj, ne plu mortos: la morto ne plu havas potencon super li. 10 Per la morto kiun li mortis, li finis kun la peko, unufoje por ĉiam; sed sian vivon li vi-

vas nur por Dio. 11 Tiel ankaŭ vi konsideru vin mem: mortintaj por la peko kaj vivantaj por Dio en Mesio Jesuo.

12 Do ne lasu la pekon regi en via mortema korpo, ne obeu ties dezirojn, 13 ne laborigu viajn membrojn kiel ilojn de maljusto obeo al la peko. Prezentu vin mem al Dio, kiel homoj <releviĝintaj> el-morte en la vivon. <Oferu> al Li viajn membrojn kiel ilojn obeo al la justeco. 14 La peko ne regu vin, ĉar vi ne staras sub la Torao sed sub la graco.

servante la justecon

15 Ĉu tio signifas ke ni do pekadu, ĉar ni ne plu staras sub la Torao, sed sub la graco? Nepre ne! 16 Estas ja klare, ke oni devas obei tiun mastron, en kies servon oni sin metas: aŭ <vi servas> la pekon — kaj tio <kondukas> al la morto — aŭ <vi servas> la obeemon — kaj tio <kondukas> al justeco. 17 Sed — dank' al Dio! — vi ne plu sklavas al la peko: plenkore vi submetiĝis al tiu speco de instruo, al kiu vi transdoniĝis. 18 Vi estas liberigitaj de la peko kaj fariĝis sklavoj de l' justeco. 19 — Parolante al homoj malfortaj mi esprimiĝas tre home. — Kiel siatempe vi metis viajn membrojn en la servon de malpuro kaj daŭre kreskanta maljusteco, tiel nun vi metu ilin en la servon de l' justeco, por via propra sanktigo.

20 Estante sklavoj de la peko, vi estis liberaj koncerne la justecon. 21 Kiajn fruktojn tiam vi ricevis? <Nur aferojn> pri kiuj nun vi hontas, ĉar ili kondukis morten. 22 Sed nun, liberigite de la peko kaj fariĝinte sklavoj de Dio, vi rikoltas sanktecon kaj finfine vivon eternan. 23 Ĉar la rekompenco por la peko estas la morto, sed la donaco de Dio estas eterna vivo en Mesio Jesuo nia Sinjoro.

liberigite de l' Torao

7: 1 Gefratoj, ĉu vi ne scias — mi ja turnas min al Tora-sciantoj¹⁴ — ke la Torao regas la homon nur dum ties vivo? 2 Ankaŭ nuptita virino per la Torao ligiĝas al sia edzo <nur> dum li vivas. Kiam li mortas, ŝi liberiĝas de l' leĝo kiu ŝin ligis al la edzo. 3 Ŝi prave konsideriĝas adulta, se dum la vivo de l' edzo ŝi fariĝos alies edzino; sed se mortis la edzo, ŝi estas leĝe libera, kaj ne adultas se ŝi sin donas al iu alia.

4 Gefratoj, tutsame ankaŭ vi — per la korpo de Mesio — mortis por la Torao, kaj nun vi apartenas al iu alia — al tiu, kiu releviĝis el la mortintoj, por ke ni fruktivu antaŭ Dio. 5 Dum ni vivis en pekoj¹⁵, en nia korpo dominis pekaj deziroj kiujn vekis en ni la

¹² Eble frazo ne kompleta.

¹³ Oni memoru, ke leĝo kaj Torao en la Greka estas unu sama vorto.

¹⁴ Alia traduko, kun aludo al la Romia juro: al homoj kiuj konas la leĝon. Certe ĝis versiklo 4 ambaŭ sencoj iom interplektiĝas: Torao aŭ (Romia) leĝo.

¹⁵ Laŭlitere: estis en la karno.

Torao, tiel ke ni fruktivis por la morto. 6 Sed nun ni estas liberaj de la Torao, al kiu ni estis ligitaj, ĉar por ĝi ni estas mortaj, tiel ke ni ne plu sklavas al la malnovaj literoj, sed al la nova realo de l' Spirito.

Torao kaj peko

7 Ĉu tio do signifas ke peko kaj Torao identus? Nepre ne! Sed <ja veras, ke> la pekon mi ekkonis nur pere de l' Torao. Pri deziro mi ne sciis, se la Torao ne dirus: *Vi ne deziras*. 8 La peko uzis la ordonon por veki en mi ĉiajn dezirojn. Sen la Torao la peko estus senviva. 9 Iam mi vivis sen Torao. Sed kiam venis la ordono, ekvivis la peko 10 kaj mem mi mortis. Tiel la ordono, kiu celis vivigi, por mi do signifis ĝuste la morton. 11 La peko uzis la ordonon por forlogi min kaj mortkonduki min per tio. 12 Sed ja sanktas la Torao, sanktas la ordono, justa kaj bona! 13 Ĉu do io bona fariĝis por mi morto? Nepre ne! Sed — kaj per tio montriĝis ĝia vera naturo¹⁶ — la peko pere de io bona estigis al mi la morton! Tiel do per la ordono montriĝas kiel ekstreme peka estas la peko.

14 Ni scias ke spirita estas la Torao. Sed mi, mi estas laŭ—karna, t.e. vendita al la peko. 15 Miajn proprajn agojn mi ne komprenas. Mi ja ne faras kion mi volas, sed kion mi abomenas, tion mi faras. 16 Sed se mi faras kion fakte mi ne volas, tio implicas ke mi jesas la Toraon kiel bonan. 17 Sed efektive ne plu mi estas la aganto, sed la peko hejmanta en mi. 18 Mi estas konscia ke en mi, t.e. en mia pekema naturo, hejmas nenio bona. La bona volo estas je mia atingo, sed fari bonon, ne. 19 Mi ne faras la bonon kiun mi volas, sed la malbonon kiun mi ne volas, mi faras. 20 Farante kion fakte mi ne volas, ne mi plu estas la aganto, sed la peko kiu loĝas en mi. 21 En mi do mi malkovras ĉi leĝon: se la bonon mi deziras fari, la malbono sin trudas al mi. 22 Mia interno¹⁷ ŝategas la Toraon de Dio, 23 sed en mia agado mi malkovras alian leĝon, kiu batalas la leĝon de mia racio, kaj kiu transdonas min kiel kaptiton al la leĝo de la peko kiu vivas en mi. 24 Ho kompatinda mi! Kiu min savos el ĉi ekzistado morteniranta? 25 Dankon al Dio per Jesuo Mesio nia Sinjoro! — Mi mem do, per mia racio servas la Toraon de Dio, sed en miaj agoj kaj faroj¹⁸ la leĝon de la peko.

vivi laŭ la Spirito

8: 1 Por kiuj estas en Mesio Jesuo, nun ne plu ekzistas kondamno. 2 La Torao de l' Spirito kiu en Mesio Jesuo vivigas, liberigis vin el la leĝo de peko kaj morto. 3 Kion ne kapablis la Torao, ĉar ĝi ja senpovas pro nia pekema naturo¹⁹, tion realigis Dio: pro

¹⁶ Laŭlitere: por ke ĝi montriĝu <es-ti> peko.

¹⁷ Laŭlitere: laŭ mia interna homo, mi.. ktp.

¹⁸ Laŭlitere: per mia karno.

¹⁹ Laŭlitere: ree karno, same kiel tuj poste.

la peko Sian filon Li sendis en ĉi saman pekeman ekziston kaj en ĉi ekzisto la pekon mem Li juĝis. 4 Tiel plenumiĝu la justeco de la Torao en ni, kiuj ne plu vivas pekeme sed laŭ la Spirito.

5 Kiuj vivas pekeme, tiuj strebas je tio, kion deziras la peko. Sed kiuj vivas laŭ la Spirito, tiuj <strebas al> kion deziras la Spirito. 6 La strebado de l' pekema naturo direktiĝas al la morto, la strebado de la Spirito al vivo kaj paco. 7 Ĉar la strebado de l' pekema naturo malamikas kontraŭ Dio. Ĝi sin ne submetas al la Torao de Dio, ĝi eĉ ne povus. 8 Kaj kiuj vivas pekeme, ne povas plaĉi al Dio. 9 Sed vi ne plu vivas pekeme, sed en la Spirito, ĉar la Spirito de Dio loĝas en vi.

Kiu ne havas la spiriton de Mesio, ne apartenas al li. 10 Se Mesio estas en vi, via korpo per la peko ja restas mortideva, sed vivas via spirito dank' al la justeco. 11 Se vivas en vi la spirito de Tiu, kiu relevis Jesuon el la mortintoj, Li kiu levis Mesion el la mortintoj, revivigos ankaŭ viajn mortemajn korpojn per la forto de sia Spirito, kiu vivas en vi.

12 Do, gefratoj, ni ne plu estas devigitaj vivi pekeme. 13 Se vi vivas pekeme, vi certe mortos. Sed se per la Spirito vi mortigas la agojn de l' korpo, vi vivos. 14 Kiuj sin lasas gvidi de la Spirito de Dio, ĉiuj estas infanoj de Dio. 15 Vi ja ne ricevis spiriton de sklaveco, kiu refoje timigu vin. Spiriton de infaneco vi ricevis, kiu igas nin ekkrii: *Abba*, Paĉjo! 16 La Spirito mem konfirmas la ateston de nia spirito, ke ni estas infanoj de Dio. 17 Sed se infanoj ni estas, ni estas ankaŭ heredantoj, kaj ja heredantoj de Dio, kune kun Mesio, ĉar ni partoprenas lian pasionon, por same partopreni lian gloriĝon.

espero je l' venonta gloro

18 Mem mi estas konvinkita, ke la suferado de ĉi epoko ne kompareblas je la gloro kies malkaŝiĝo estas venonta. 19 Ankaŭ la kreaĵaro arde sopiras je l' malkaŝiĝo de la infanoj de Dio. 20 Ĉar ĝi estas submetita al ekzistado sensenca, ne ĉar mem tion ĝi volas, sed pro <la deziro de> Tiu, kiu submetis ĝin al ĝi. 21 <Sed ĝi> ne <estas> sena je espero, ĉar ankaŭ la kreaĵaro estos liberigita el la sklaveco de l' pereemo kaj partoprenos la gloran liberon de la infanoj de Dio. 22 Ni ja scias ke la tuta kreaĵaro ĝemas kaj suferas naskospasmojn — daŭre ĝis nun.

23 Kaj ne nur ĝi — ankaŭ ni mem, kiuj ja jam ricevis la unuaaĵojn de la Spirito, ankaŭ ni ĝemas pro nia propra sorto, ankoraŭ atendente, ke ni estos akceptitaj kiel infanoj, kaj ke liberigis nia korpo. 24 En ĉi espero ni estas savitaj. Sed espero jam vidata ne plu estas espero: kiu ja ankoraŭ sopiras al kion li jam vidas? 25 Ĉar nia espero direktiĝas al la nevidebla, nia atendo estu akompanata de persistemo.

26 Same, ankaŭ la Spirito subtenas nian malforton. Ĉar ni eĉ ne scias, kiel preĝi ni devus, sed la Spirito mem pledas por ni per neeldireblaj suspiroj. 27 Kaj Li kiu travidas la korojn, scias kion celas la Spirito, ĉar Ĝi pledas por la sanktuloj laŭ la intenco de Dio.

28 Ni scias ke por kiuj amas Dion, ĉio ŝanĝiĝas en bonon por tiuj, por la homoj kiuj estas vokitaj laŭ Lia decido. 29 Ĉar kiujn anticipe Li konis, tiujn ankaŭ anticipe Li destinis por konformiĝi al la bildo de Lia filo, por ke tiu estu la unu-

enaskito inter multaj gefratoj. 30 Kiujn Li antaŭdestinis, tiujn Li ankaŭ vokis. Kaj kiujn Li vokis, tiujn Li justigis, kaj kiujn Li justigis, tiujn Li gloris.

la amo de Dio

31 Kion ankoraŭ ni aldonu? Se Dio estas por ni, kiu do estos kontraŭ ni? 32 Li mem eĉ ne indulgis Sian filon: lin Li transdonis pro ni ĉiuj. Kaj post tia donaco, ĉu Li ne donu ankaŭ la ceteron? 33 Kiu akuzos la Diajn elektitojn? Ĉu Dio *kiu justigas* ilin? 34 *Kiu kondamnos* ilin? Ĉu Mesio Jesuo kiu mortis, ja kiu estis relevita kaj kiu, sidante je la dekstra flanko de Dio, porpledas nian kazon? 35 Kiu disigos nin de la Mesia amo? Ĉu premateco aŭ misero, persekuto aŭ malsato, nudeco aŭ vivdanĝero aŭ la glavo? 36 Estas ja skribite:

Pro Vi oni mortigadas nin la tutan tagon;
ni estas traktataj kiel ŝafoj buĉotaj.

37 Sed pri ĉio ĉi glorie ni venkos, dank' al Tiu kiu nin amas.

38 Mi estas konvinkita, ke nek morto nek vivo, nek anĝeloj nek potencoj²⁰, nek kio estas nek kio estos, nek povoj supre aŭ sube, nek iu ajn alia kreitaĵo povos disigi nin de la amo de Dio, kiu estas en Mesio Jesuo nia Sinjoro.

²⁰ Vidu 1 Kor 3:22.

RUSIO

LA VIVO DE LA JUSTA SIMEONO

La justa Simeono naskiĝis en Eŭropo, en Rusio. Pri liaj gepatroj, oni konas nur tion, ke ili estis homoj eminentaj kaj apartenis al la respektinda socia tavolo de nobeluloj, tamen iliaj nomoj estis nekonataj. La gepatroj de Simeono estis piaj homoj kaj multe zorgis pri la bona edukado de sia filo. Ili faris lin bona kaj vere kredanta kristano. Pri tio montras la tuta vivo de Simeono. Ankaŭ oni ne konas la ĝustan jaron de la naskiĝo de Simeono.

Oni supozas, ke li naskiĝis ĉirkaŭ la jaro 1607, t.e. dum la malĝoja tempo por Ruslando, kiam nia Patrujo povus pereji pro la intrigoj de pseŭdoreĝoj kaj pro la enlandaj malkonkordoj, kiam en Ruslando laŭ la rimarko de kronikisto: „ĉiuj deziris esti pli altaj laŭ la rango”. Komence de la frua aĝo Simeono sentis abomenon kontraŭ provivaj bonoj kaj emocioj. Komence de la juna aĝo li aspiris al pensoj pri Dio, kaj al utilaj glorigoj por la animo. Tamen la medio ege malhelpis lin. Do, la justa Simeono serĉis izolecon por pli oportune uzi siajn glorigojn kaj evitis malutilajn por la animo, konfuzajn eventojn kaj ekscitojn, kiuj regis en tiu tempo en la rusa lando.

Do, la justa Simeono decidis forlasi sian Patrujon, riĉaĵojn, honorojn kaj gloriojn, kaj iris al malproksimaj lokoj por libere glorigi tie. Li elektis Siberion, kiu estis antaŭnelonge alligita al Rusio, kaj kiu estis ankoraŭ ne bone konata al la rusaj homoj. Inter la tiamaj loĝantoj de Siberio nur kelkaj homoj aŭdis pri kristanismo. Interalie tie loĝis multe da skismuloj, kiuj estis aŭ ekzilitaj tien

de la registaro, aŭ proprvole forkuris tien.

Alveninte Siberion, la sankta Simeono loĝis en vilaĝo Merkuŝino, kiu troviĝis 50 verstojn (53 km) de la urbo Verĥoturje, kaj kiu situis sur la bordo de la rivero Tura. La urbo Verĥoturje estis fondita nelonge antaŭ la alveno en Siberion de la justa Simeono, nome en la jaro 1598. La urbo tiutempe estis grava komerca loko, kiu troviĝis sur la vojo el Ruslando tra la urbo Solikamsk en la foran Siberion. La vilaĝo Merkuŝino estis fondita en la jaro 1620. La ĉirkaŭaĵoj de la vilaĝo estis tre belaj kaj majestaj. Tie oni povis vidi grandajn rokojn kaj dezertajn ebenaĵojn, montetojn, kovritajn per majestaj ĉiamverdaj arboj, cedroj, abioj, pinoj. En la vilaĝo Merkuŝino estis ankoraŭ la preĝejo de la Sankta Ĉefarmeestro Miĥaelo. Al la justa Simeono plaĉis viziti ĝin. Tie li sincere kaj fervore preĝis. La loko plaĉis al Simeono kaj li ekloĝis tie.

Tamen loĝante en la vilaĝo Merkuŝino la justa Simeono ne havis tie konstantan difinitan loĝejon, sed transiris de unu domo en la alian. En tio precipe helpis la okupo, per kiu la justulo subtenis sian vivon. Li okupiĝis pri tajloraj aferoj. Li fariĝis tajloro post kiam li forlasis la gepatran domon. Kutime la vilaĝaj tajloroj kudras vestaĵojn ne en siaj domoj, kiel en urboj, sen en la domoj de siaj klientoj, kien ili venas kutime laŭ ilia peto. Dum la tuta periodo de sia laboro la tajloroj, kiuj kudras vestaĵojn por kamparanoj, loĝas, manĝas kaj dormas kune kun la klientoj en iliaj domoj.

Kelkaj Rusiaj ekleziaj statistikoj

Nombro de preĝejoj kaj pastroj en la Jekaterinburga eparĥio (diocezo)

jaro	1994	1995	1996	1997	1998
preĝejoj	94	124	150	171	201
pastroj	139	152	189	240	269

Nombro de dimanĉaj bibliaj lernejoj en la Jekaterinburga eparĥio

jaro	1994	1995	1996	1997	1998
lernejoj	27	31	58	83	88
lernantoj	1230	1435	1920	2859	3214

La justa Simeono ne ignoris la malbonajn kondiĉojn de la kamparanaj domegoj kaj fervore okupiĝis en ili pri la tajloro metio. Vere alta modelo de humileco kaj pacienco li estis!

La justa Simeono kudris precipe peltojn kun pasamentoj. Se la klientoj estis malriĉaj, Simeono rifuzis preni monon por sia laboro. Loĝejon kaj manĝaĵon li konsideris kiel sufiĉan pagon por sia laboro. Por eviti preni la pagon, li ne ĉiam finis sian laboron kaj frue matene lasis la domojn de siaj klientoj kaj iris al alia loko. Pro tio li estis ofte batita, sed li eltenis ĉion, ofendojn kaj batojn, kvazaŭ ili estus tute meritoplenaj.

La alia ŝatata okupo de la justa Simeono estis fiŝkaptado. Por tiu celo li ofte foriris el la vilaĝo Merkušino foren je 10 verstoj en izolitan lokon kaj tie sur la bordo de la rivero Tura sub larĝbranĉa abio li sidiĝis kun fiŝhoko en la mano kaj komencis fiŝkapti. Samtempe li pensis pri la grandeco de nia Kreinto, kiu faris niajn teron kaj ĉielon. Tamen dum la okupo la justa Simeono zorgis pri modera kaj abstina vivo. Li kaptis fiŝojn tiom, kiom necesis por lia taga manĝaĵo. Nun oni povas vidi sur la bordo de la rivero Tura la ŝtonon, kie ŝatis sidi la

Larisa KUZMENKO

justulo dum fiŝkaptado. La malsupra parto de la ŝtono eliras antaŭen kaj estas fomforte meti tien piedojn kaj kapti fiŝon.

En Siberio en la preĝejo ne venis multaj kristanoj. Multaj homoj estis paganaj. Estis homoj, kiuj havis paganajn kaj kristanajn tradiciojn. La justa Simeono ofte parolis kun la homoj kaj instruis ilin pri la Kristana kredo, pri la Biblio. La homoj atente aŭskultis lin. Liaj paroloj estis simplaj kaj sinceranimaj. La justa Simeono suferis pro ventraj malsanoj kaj mortis kiam li estis juna en la aĝo de 35 jaroj. La loĝantoj de la vilaĝo Merkušino profunde estimis la sanktulon kaj honore enterigis lin apud sia paroĥa preĝejo al Ĉefarmeestro Miĥael.

Vere, la justa Simeono estis sankta kaj pia homo. Ĉar laŭ la vortoj de nia Savanto (Marko 8:34) „*Se iu volas veni post mi, li abnegaci sin, kaj levu sian krucon, kaj sekvu min*”, kaj laŭ Mateo 10:37: „*Kiu amas patron kaj patrinon pli ol min, tiu ne estas inda je mi; kaj kiu amas filon aŭ filinon pli ol min, tiu ne estas inda je mi*”.

LA VIZITO DE LA PATRIARKO

Niĝni Tagil (Rusio).

La 25-an de septembro, 2000, la urbon Niĝni Tagil vizitis la Patriarko de la tuta Ruslando, Aleksio la dua.

Li vizitis unu el la belaj preĝejoj de nia urbo, la preĝejo de la Sankta Triunuo. Dum la soveta periodo, la preĝejo estis stokejo, kaj nur antaŭ dek jaroj oni komencis restaŭri ĝin.

Larisa KUZMENKO




Iras rapide la restaŭrado de la preĝejo.



Restaŭrado daŭras.

Ĉiuj fotoj el
Pravoslavni Vestnik.



Tia aspektis la preĝejo en 1999.



Tia aspektis la preĝejo dum la tago de renkontiĝo kun la Patriarko.



La urbestro de nia urbo kun la homo de la preĝejo, kiu zorgas pri la ejoj de la preĝejo.



Oni renkontas la Patriarkon kun pano kaj salo (rus-manierre).

NOVA TRADUKO DE WILLIAM AULD

Usona verkisto James Branch CABELL (1879–1958) publikigis pli ol 50 romanojn, kaj «*Jurgen*» (1919) estas la plej konata el ili. Ĝian sukceson akcelis tio, ke en Novjorka juĝejo ĝi estis akuzita pri maldeco kaj obsceno. Sed ne serĉu tiujn en la libro!..

Jurgen estas lombardisto en imagita lando, iama poeto, kiu regajnas sian junecon, retenante la saĝon kaj sper-ton de sia matura aĝo. Serĉante sian forsorĉitan edzinon, Jurgen travojaĝas fantaziajn kaj legendajn teritoriojn, inkluzive de la kristanaj Infero kaj Paradizo, prosperante ĉe belaj virinoj (ekzemple, Helena de Trojo) kaj ĉiam plialtiĝante range, ĝis fine li renkontas la ĉiel-potencan Koŝĉej (kiu «faris ĉiujn aferojn tiaj, kiaj ili estas») kaj petas, kun interesaj sekvoj, redonon de la edzino.

Interalie, «*Jurgen*» estas la plej ŝata libro de William AULD, kiu majstre tradukis la majstroverkon de CABELL. «*Sezonoj*» (Ruslando) eldonis ĝin kiel la dekan volumon en la serio «*Mondliteraturo*».

La 240-paĝa fortike bindita libro estas mendebla kontraŭ 18 euroj ĉe UEA, FEL, ELNA kaj aliaj gravaj libro-servoj, ankaŭ rekte ĉe la eldonejo poŝte aŭ rete.

TRANS LA SPEGULO

La Esperanta traduko de «*Alico en Mirlando*» de Lewis CARROLL, eldonita en aŭgusto 1999 estis elĉerpita jam fine de 2000. En junio 2001 «*Sezonoj*» (Ruslando) eldonis la duan libron de CARROLL pri Alico — «*Trans la Spegulo kaj*

kion Alico trovis tie». Same kiel la unuan libron pri Alico ĝin tradukis Donald BROADRIBB.

«*Trans la Spegulo*» aperis kiel la 11-a volumo en la populara libroserio «*Mondliteraturo*». La libro havas belan plenkoloran kovrilon de Maŝa BAĴENOVA kaj ilustraĵojn de John TENNIEL interne. La 128-paĝa libro estas mendebla ĉe la eldonejo poŝte aŭ rete:

RU-236039 Kaliningrad, ab.ja. 1248; <sezonoj@yahoo.com> kontraŭ 9 eŭroj.

Cetere, «*Trans la Spegulo*» markas etan jubileon; ĝi estas la 75-a libro, kuneldonita de Halina GORECKA kaj Aleksander KORĴENKOV.

Halina GORECKA



Ridetu!!!

Ridetu matene, ridetu vespere,
ridetu ĉiam, sen fin'.
Al hela ĉielo, al suno kaj steloj
ridetu, mi petas **vin**.

Rideto ja estas unika rimedo
kontraŭ ĉagren' de la kor'.
Dum via rideto la mond' plibeliĝos
kaj tristo tuj iros for.

Ridetu al vivo rapide fluanta,
al via favora sort'
al homoj tre lacaj kaj maljuniĝantaj
ridetu ofte, sen vort'.

Ridetu al ĉiuj dum tera migrado,
ridetu ankaŭ al mi.
Rezulte de via serena rideto
feliĉo gastos ĉe vi.

Czesław BARANOWSKI

Bulgario urĝe bezonas nian solidarecon!

La 5-an de novembro de la pasinta jaro, por la dua fojo, vojaĝis Bulgario Jacques TUINDER, iniciatinto kaj nuna prezidanto de Stichting Zienderogen (Fondaĵo «Evidente»). Lin akompanis lia ĉiam preta (blinda) konsilisto Jan VERHEULE. Ĉefcelo de la vizito estis: surprizi blindan virinon talentitan kaj senlaboran – antaŭ nelonge ŝi universitate diplomigis pri la angla lingvo – per kompleta brajlokomputilo. En junio 1999, kiel varmaj geamikoj niaj bone scias, ili feliĉigis samideanon duoble handikapitan, senvidpovan kaj senmanan, en la sama maniero.

La duopo vizitis tri urbojn. En Plovdiv ili renkontis membrojn de la komitato, kiu organizos la venontjaran Internacian Kongreson por Blindaj Esperantistoj. La kunveno okazis en la Rekapabla Centro, kies (blinda) direktoro perfekte parolas Esperanton. Dum ilia restado 'la bona lingvo' ofte utilis kaj montris sian tradicie interamikigan rolon. Menciinde estas ke tiu Centro ricevis tre valoran helpon el Nederlando, eĉ en plej videbla maniero, kvazaŭ oni principe konatiĝas kun nederlanda instituto (kvankam pro la ekonomia krizo, ankoraŭ multego mankas aŭ nesufiĉas!).

La dua urbo, kiun la ambasadoroj de «Evidente» vizitis, estis Gabrovo. Tie ili denove renkontis la amikon, kiun la organizaĵo antaŭ longaj jaroj invitis pro komplika okulooperacio. Ili gastis ĉe lia familio. Oni organizis renkontiĝon kun la regiona porblindula asocio, el kio konkludendas ke la situacio por la vidhandikapitoj de tago al tago pli-

malboniĝas. Troviĝas sufiĉe multe da blindaj infanoj, al kiuj ĉefe gevolontuloj klopodas krominstrui. Tio malfacilas, ĉar kronike mankas lerniloj kaj aliaj ebligiloj.

La lastan tagon la duopo estis en Sofio, kie ili havis bonegan kaj amiketosan renkontiĝon kun du tre afablaj kaj gastamaj gravuloj de la Bulgara Unuiĝo por Vidhandikapitoj, D-ro Morfi SKARLATOV, departementestro, kaj la blinda vic-prezidanto Vladislav KATSARSKI. Ili akceptis la nederlandajn gastojn kiel 'anĝelojn el la ĉielo' ĉar la organizaĵo baraktas kontraŭ montegoj da zorgoj, obstakloj kaj problemoj. Ĉie aŭdeblis ke homoj laborantaj jam dum monatoj ne ricevis salajron. Kaj oni komprenu, ke gedungitoj en hospitaloj, lernejoj, institutoj k.s. akiras nur minimuman rekompencan por la laboro, kiun ili devas fari sub ofte plorigaj kondiĉoj. „Dio benu vin, sed bonvolu helpi al ni, ĉar ni ne plu kapablas plenumi niajn taskojn. Ni bezonas pli da ekipaĵo, kaj ĉefe kaj urĝe ni bezonas brajlan paperon; ni eĉ ne plu povas presi lernolibrojn nek gazetojn kaj revuojn. Disheroldu laŭte niajn terurajn vivocirkonstancojn!”

La nederlandanoj ĉie aŭdis, ke la ŝtatvizito de ilia reĝino faris profundan impreson al la bulgara popolo. Sekve iom post iom naskiĝis inter ili, ambaŭ 'orangnasaŭe kavaliriĝintaj', la ideo skribi leteron al reĝino Beatrix kun la petego finance iom subteni la helpon, kiun fondaĵo EVIDENTE intencas doni al la bulgaraj blinduloj kaj malforte vidantoj.

Kiam la prezidanto de Evidente revenis hejme, li tuj kontaktis la geamikojn, kiuj tiom asistis havigi al Albanio bonege funkciantan brajlopresejon, konsili kaj helpi ankaŭ rilate al Bulgario. Esperante ke ankaŭ KELI-anoj restos fidelaj al la afero, oni mendis en Prago brajlopaperon por monsumo de 5000 usonaj dolaroj. Kaj ĉar en Sofio mankas printilo ambaŭflanke prespova, Evidente promesis serĉi ĝuste tian aparaton. Dank' al la ĉielo, jam rapide ĝi troviĝis, kaj eĉ por amika prezo! Kaj la plej granda miraklo estas, ke la samaj noblaj homoj, kiuj dum tiom da jaroj aktivis en Albanio tion intencas fari ankaŭ por Bulgario. Kaj ili sendos ne nur materian helpon, sed aldonos siajn personajn konojn kaj spertojn. Kiel adekvate danki al la sindediĉa edzoparo Mathilde kaj Hans Baumann kaj la grandioze kontribuanta Brajlocentro PROSON en Ermelo?

Pli laste: la 26-an de januaro Cor DEKKER, sekretario de Evidente kaj unualo-ke responsa pri ĉiuj konstruprogramoj, vojaĝis Tiranon, ne nur por bone kontroli la jam pretajn laborojn en la tiea Blindulejo, sed ankaŭ por iom propramane perfektigi ĉion faritan laŭ, kion diri por montri komprenemon, siaj personaj profesiaj normoj...

Plej laste: prosperas la novkonstruado de la blindulejo en Batticaloa, urbo en la nord-orienta provinco de Srilanko.

Jacques TUINDER



Demandaro ĉe la sojlo de la nova jarcento

Gaje komenciĝis la nova jarcento, sed kia ĝi estos por la homa gento?

Ĉu plu nin timigos aktivaj vulkanoj, danĝeraj tertremoj, inundoj, malsanoj?

Ĉu ni havas ŝancon venki la kanceron kaj purigi nian toksigitan teron?

Kiam malaperos mizero, malsato, kaj de narkotaĵoj la nigra merkato?

Kiel longe daŭros la monda armado kaj atomnuklea militproduktado?

Ĉu povas ekregi stabila mondpaco sen lingvo komuna kaj sen **Dia Graco**?

Kiam en la gloro sur la tuta tero estos parolata lingvo de l' espero?

Fluas la demandoj el la korprofundo, sed pli bone lasi ilin sen respondo.

Czesław BARANOWSKI

En 1642, li vojaĝis de Anglio al Svedio. Lin invitis Louis DE GEER, ege riĉa nobelulo en nia lando. Ebligis por COMENIUS prezenti siajn lerneajn reform-planojn al du gravaj ŝtatestroj, Axel OXENSTIERNA kaj Johan SKYTTE, membroj de la regna konsilio. Komisiite de ili kaj per ekonomia subteno de DE GEER, COMENIUS ellaboris lernolibrojn por la instruado de la latina lingvo en la svedaj lernejoj. Tamen, li ne trovis sufiĉan apogon ĉe la sveda registaro.

Pro tio, li poste vojaĝis al Hungario. Tie, li finfine ricevis eblecojn realigi siajn ideojn pere de instruejo en Saros-Patak, fondita de li (1650–1654).

Siajn lastajn jarojn li kviete pasigis en Amsterdamo, ekonomie subtenata de filo de Louis DE GEER.

Krome dum sia restado en Stokholmo, COMENIUS vizitis Reĝinon Kristina. Ŝi alparolis lin en tre bona latino. Surprizite, li demandis ŝin:

– Kiamaniere vi lernis tiel bone?

– Pere de via lernolibro, ŝi respondis.

Nia delonga membro, Prof. Rudolf HORSKÝ, doktoriĝis pri COMENIUS.

Britta REHM

kun aldonaj informoj de Āke AHLRÉN



KOKCINELO

Oranĝa kokcino trafe malsuprenflugis sur mian ŝultron. Ĝi haste paŝetis esplorante la ŝtaton de mia jako kaj haltis pripensante farotaĵon.

– Du, kvar, kvin, sep, – nombris mi la rondajn makulojn sur ĝiaj flugilŝeloj.

– Do vi vere kredas ke mi estas sep-jaraĝa, – subite diris ĝi.

– Mi ne scias.

– Nek mi scias mian aĝon...

– Kie vi pasigis la vintron? – demandis mi.

– Kio estas vintro?

– Neniu folio, neniu verdaĵo, nur neĝo surtere kaj sur la branĉoj. Malvarmo regas ĉie.

– Tio ne eblas, – ridetis la kokcino, – la foliaro ja estas la vesto de la arboj, oni ne iradas senveste, kiam malvarmas.

– Jes, sed la arboj vestas sin per neĝo... diru, kial oni nomas vin Dia insekto, Dia bovineto, kaj ni, la Armenoj, nomas vin Pasko.

– Certe oni pravas, ĉar ĉiu kreitaĵo apartenas al Dio, kiu donis al ni vivon. Eble oni nomas min tiel pro tio ke mi ekflugas rekte, supren, kvazaŭ rekte ĉielen kaj tuj malaperas. Pasko? mi ne scias. Eble pro tio, ke mi similas ovon porpaskan kolore farbitan? Sed Pasko ne estas farbado de ovoj. Pasko estas venko super la morto. Mi simple memorigas pri la reviviĝo de Kristo kaj la vivo eterna. Ĝuste pro tio mi foje malsuprenflugas sur ies ŝultron...

– Kion scias pri l' eterneco vi, naskiĝinta ĉi-somere?

– Nur tion, ke la Eternulo estigis ĉion per sola Vorto.

Kaj la kokcino disigis la flugilŝelojn kaj malrapide enaeriĝis lasinte en la vespera ĉielo krajonan spuron.

Yenovk LAZIAN (rajtoj rezervitaj)

PRI KOSMA KONSCIO

Mia frato donis al mi informilon de unitariistoj el najbara urbo. Mi tralegis la programon de estontaj kunvenoj kaj mian atenton altiris unu temo: kosma konscio. Mi citas: „Al tio celas amo de Kristo, vojo de mistikuloj kaj joganoj, pro tio vivis ĉe ni Keltoj, tion serĉas hodiaŭ unitariismo”. Tiuj vortoj instigis min primediti, kiel tiu kosmokonscio resp. guliĝas en la Biblio kaj en mia kredo. Kvankam la termino „kosma konscio” ne troviĝas en la Biblio, ĝia senco plenigas la tutan Biblion. Mi rememoras la noktan vizion de Jakobo laŭ Genezo 28:12. Li ekkonis la teron kunigitan kun la ĉielo, anĝelojn prizorgantajn la teron kaj vidis sin mem en sia mizero kiel objekton de ĉiela prizorgo. Ni konas en la Malnova Testamento plurajn sciigojn pri revelacioj de anĝeloj. Travivis tion Gideon (Juĝ 6:11-24). Spertis tion Eliŝa (2 Reĝ 6:11). Ankaŭ la psalmisto ĉerpis forton el tiu „kosma konscio” laŭ Psa 91:11-12.

Nova Testamento profundigas la rigardon en nian komunecon kun la ĉiela mondo. Jesuo instruas nin preĝi: „Plenumiĝu via volo, kiel ankaŭ en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero!” La ĉielan sferon ni devas havi antaŭ la okuloj kiel ekzemplon por transformado de la surtera mondo. Profunda perspektivo! Rilato de ĉiela sfero al ni estas rilato de amintereso (Luk 15:7).

Laŭ la unua epistolo de Petro (1:12) la predikado de la Evangelio altiras la intereson de anĝeloj. Ankoraŭ pli profunde eldiras tion Paŭlo en Efe 3:10. La ĉielanoj lernas ekkoni la saĝecon de Dio rigardante la spiritan vivon de la Eklezio. Ni do estas lernolibro por ili. Mirinda sciigo! Ĉu ni konsciiĝas pri tio ĉeestante Diservon? Peko disŝiris ne nur nian rilaton al Dio, sed ankaŭ al anĝeloj. La ofero

de Jesuo Kristo havas do konsekvencojn ankaŭ tiuflanke. Parolas pri tio Paŭlo en Efe 1:10. Ambaŭ sferoj estos kunigitaj, ĉar tio estis kaŝita plano de Dio kun la homaro. Grandioza vizio de kredo!

Plej profundan rilaton inter tero kaj ĉielo malkovras Apokalipso. En la kvina ĉapitro, Johano en vizio vidas libron sigelitan. Ĝi enhavas misteron pri efektiviĝo de la Diaj planoj kun la homaro. Oni serĉas personon kapablan malfermi tiun libron. Malfermi signifas samtempe efektiviĝi. Neniu estas trovebla por tiu tasko. Johano ploras. Sed anĝelo montras al li Jesuon, kiu akceptas el la mano de Dio la libron kaj po parte malfermas ĝin. Miradoj de anĝeloj esprimas laŭdon al Dio kaj al la Ŝafido, ke la planoj kun la mondo estos efektiviĝitaj kaj partoprenas en la plenumado de la malkovritaj misteroj. La okazintaĵoj sur la tero estas laŭ la sekvan-taj ĉapitroj en la centro de ilia intereso ĝis ekesto de la novaj tero kaj ĉielo.

Mi revenas al la komenco. Unitariistoj serĉas la kosman konscion. Oni scias, ke ili rifuzas la diecon de Kristo. Sed ĝuste Kristo, Filo de Dio, estas la centro de la kosmo, kaj kosman konscion li donacas al tiuj, kiuj lin en sian koron akceptas.

Mia frato diris al mi, ke mi limigas mian pensadon per bibliaj dogmoj. Mi penadis klarigi al li, ke mia kredo ne staras sur ia dogmo, sed sur la interna sperto kun Jesuo Kristo. El tiu sperto elkreskis la unua kristana komunumo en Jerusalemo. Sed Kristanoj devis konfesi sian kredon, prediki, instrui. Tio postulis formuli, envortigi la internan sperton kun Kristo. Tiel estiĝis dogmoj, konfesoj, ekzemple la Atanzia kredokonfeso (=simbolo). Akceptas ĝin mia Eklezio Frata, kaj la Ĉeffrata Evangelika Eklezio. Sed la kredo ne kreskas el dogmoj, sed el persona renkontiĝo kun Kristo.

Josef POKORNÝ

15-a Ekumena Esperanto-Kongreso

Mallonga raporto

En Zagreb (Kroatio) de la 14-a ĝis la 21-a de julio 2001, ni, 160 personoj el 20 landoj, kunvenis por la 15-a Ekumena Esperanto-Kongreso. Kun ni troviĝis 40 gejunuloj.

Per la komuna lingvo Esperanto, ni povis babili, studi, preĝi.

La karakteron de ĉi tiu kongreso donis la ĵusa apero de «Adoru», nia komuna Diservo-libro, kiun ni inaŭguris per la uzo. En ĝi troviĝas kaj preĝtekstoj, kaj liturgiaj tekstoj, kaj himnoj el tre diversaj fontoj.

Ni ne scias ĉu ekzistas en iu alia lingvo tia libro, kiu enhavas kompletajn Diservajn liturgiojn, kiel la Lima-liturgio, la Sankta Liturgio de S-ta Krizostomo, pluraj rom-katolikaj, luterana, reformita, anglikana, pluraj formoj el Taizé. Ankaŭ ĝi enhavas gregoriajn liturgiojn de la horoj, kaj preĝojn por plej diversaj okazoj.

La varieco de la prezentitaj himnoj,



ĉu tradukitaj, ĉu originalaj, estas ankaŭ certe tre malofta. Dank'al tiu libro, animzorgado de iu ajn Esperanto-aranĝo estos faciligita. Ĝi povus ankaŭ esti tia ilo por iu ajn internacia kunveno.

Ni, de jaroj (1-a Ekumena Esperanto-Kongreso en 1968 en Limburg/Lahn) praktikas ekumenismon, kaj ni dankas al Dio, ke Li permesis al ni alveni ĝis tiu nuna punkto, dank' ankaŭ al nia komuna lingvo Esperanto.

Inter diversaj prelegoj, ni ankaŭ havis la ŝancon aŭskulti, interpretitan, unu el la romkatolikaj kroataj respondeculoj pri ekumenismo, Jure ZEČEVIĆ.

Nia venonta ekumena rendezuo estos por 2003. En 2002, la du ligoj aparte kongresos, respektive: KELI en Hungario, kaj IKUE en Ĉeĥio.



Philippe COUSSON